

ESPERANTA FINNLANDO

1968 numero 3

Marto

Evidentaj ĝis ekstremo

PRI NEOLOGISMOJ

Oni skribis kaj disputis pri neologismoj iam kaj tiam, kaj ree antaŭ nelonge. La problemoj ŝajnas esti konstante tikla.

Estas ja klare, ke la progreso de la tekniko kaj kulturo postulas novajn esprimojn, kaj ne ĉiam estas eble konstrui la necesajn vortojn laŭ la reguloj de nia lingvo el la jam ekzistantaj elementoj. Sed same klara estas la fakto, ke multajn neologismojn oni enkondukis senkritike kaj nebezone.

Ni ne volas fari studon pri la tuta problemoj, sed ni kontentiĝas je kelkaj aktualaj ekzemploj. *Valuto* signifas rilatan valoron de ŝanĝmono al iu normo. *Devaluto* ne povas esti derivaĵo de *ĝi* (devalutigo povus eble esti logike *ĝusta*), kaj do estas neologismo *ĝena*, ĉar *ĝi* aspektas kvazaŭ *esperanta* derivaĵo. Nenio malhelpus diri simple "devalorigo" de mono. — Parolante pri Unuiĝintaj Nacioj oni notas *ĝian asembleon*, kaj tamen temas nur pri "ĝeneralkunveno" (kontraste al kunvenoj de sekcioj, komisionoj aŭ komitatoj).

Kio koncernas la *mal-vortojn*, estas grava eraro pretendi, ke ili unue elvokus la penson pri malo de tio, kion oni volas esprimi. La plej multaj el la vortoj

ofte uzataj, kun la prefikso 'mal' estas tiel enradikiĝintaj en la ĉiutagan lingvon, ke estas miskompreno de la esenco de l' lingvo diri, ke malbela, malbona, malalta, malamika, malami, malaperi ne estas senpere kaj senmedite kompreneblaj. Ekzistas nur kelkaj esceptaj kazoj, kiel malfermi kaj maldekstra kiuj ŝajnas neoportunaj aŭ malpraktikaj. 'Malfermi' pro tio, ke *ĝi* ne signifas ian malpli valoran aŭ pli malbonan agon ol 'fermi', kontraste al preskaŭ ĉiuj aliaj mal-vortoj. 'Maldekstra' ĉefe pro sia longeco ne taŭgas ekz. kiel komanda vorto, sed 'sinistra' ja havas saman nombron da silaboj, kaj tute ne solvas la problemon. Aliparte, la novaj surrogatoj de la mal-vortoj ofte elvokas nenian aŭ malĝustan imagon. *Pigra* (maldiligenta!), *plumpa*, *orgojla*, *poltrona* nenion diras almenaŭ al finna aŭdanto, kaj kiu okaze konas la latinan proverbon "*naturalia non sunt turpia*" ricevas la impreson, ke *turpa* signifas 'hontinda', dum *ĝi* devus signifi 'malbela'.

Aliparte ĉiam ekzistas la danĝero, ke enkondukita neologismo (kiu ordinare ne estas tradukata samtempe) estas miskomprenata. Tiel mi trovis la vorton *sinistra* en la senco terurige malluma, kaj *bunta*, enkondukita kiel grava termino por la kolorsistemo (malbuntaj

estas la serio "blanka – griza en ĉiuj gradoj – nigra", ĉiu alia koloro estas bunta) estis pli ofte uzata por 'multkolora', kiel tute nenecesa duoblaĵo por tiu koncepto.

Kio koncercas la pretendon, ke 'mal' kiel senakcenta silabo ne sufiĉe forte ekcentus la negativan sencon en la kunmetita vorto, oni unue devas memori, ke eminentaj parolistoj akcentas ĝin, se necese; tiel faris ekz. Edmond Privat. Aliparte Esperanto ne estas la sola lingvo, kie la negativa elemento (ekster 'mal' ankaŭ 'sen-' kaj 'ne-') estas en senakcenta silabo. En rusa lingvo la prefikso 'bes' au 'bez' tre ofte estas senakcenta (la Rusa-Esperanta vortaro de E.A. Bokarev donas ĉ. 170 tiajn) en kunmetita vorto, kaj en finna lingvo, kie akcento ĉiam estas sur la unua silabo, la negativa senco estas esprimata per sufiksoj (substantive -tta: talotta = sen domo; adjektive -ton: taloton = sendoma), kiuj neniam povas ricevi akcenton. Same estas senakcenta la negativa sufikso en germana (-los: Vaterlos = senpatra) kaj sveda (lös: faderlös = senpatra), same kiel en dana kaj norvega, kaj ankaŭ en la angla (less: motherless = senpatrina). La timo pri senakcenta maldo estas tute senbaza.

Alia afero estas, ke la tekniko kelkfoje necese bezonas mallongajn nociojn.

Kvankam restas nur kiel malicaĵo de la konkurantoj de Esperanto la pretendado, ke anstataŭ 'telefono' ni devus diri 'malproksimenparolilo', estas klare, ke ni devas havi la rajton ankaŭ paroli pri telekomunikaĵoj, kaj ke 'longdistanca telefona interparolo' devas esti prononcebla per pli oportuna esprimo. Ne multe helpas, se *lontana* prenis la rolon de malproksima – kiel iu verkisto pretendis. Bedaŭrinde ne estas eble trovi la solvon de tiu detalproblemo el Scienca kaj Teknika Terminaro (kiu estas nur alfabeta); la sola racia solvo, kiun ni vidis, estas 'fernparolo' (tele- estas rezervenda por pli specialaj bezonoj, kaj la nomita Terminaro ne enhavas por la celo iun el la proponitaj dist-, fern-, lontan-).

Resume: Por la ĉiutagaj bezonoj neologismoj estas evitendaj ĝis ekstremo. Por tekniko kaj scienco ili estas bezonaj, sed elektendaj kun detala kaj profunda pripensado. La kerno de la afero estas ja tio, ke al franco aŭ anglo estas facile enkonduki vorton el sia lingvo kaj tiel kaŭzi malfacilaĵon precipe al ni, ne-hindoeŭropanoj, dum la konstruo de pure Esperanta derivaĵo postulas iom da enprofundiĝo, eĉ logika pripensado kaj eltrovemo, kiujn ne ĉiu posedas.

V.S.

HELSINGÖR

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos 21.–28. de julio en la internacia altlernejo (tute moderna) de Helsingör, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
ÅBYHÖJ, Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ, (13.–19. de oktobro) ĉe Århus, Danlando. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.

PRI NIA GAZETARO

Ni ricevis sciigon, ke komence de la ĉijara januaro reaperas "Biblia Revuo", kiu enhavas originalajn artikolojn k.a. pri bibliaj kaj orientaj temoj. La revuo aperas dumonate per ĉ. 64-paĝaj kajeroj. Redaktoro: Dro D. Broadribb, Aŭstralio. Adreso de la eldonejo: Biblia Revuo, Piazza Duomo 4, 48100 RAVENNA, Italio. Abonprezo: 6 usonaj dolaroj (25,20 mk).

Ni ricevis specimenon de "Paco" (monata organo de Mondpaca Esperantista Movado), kiu ĉiumonate aperas en malsama lando. La speciamento estas 32-paĝa (A4) duobla numero el Ĉeĥoslovakio. Abonebla per: Järvinen, Västra, KEIMOLA; prezo 5 mk/jaro. Ĉiu abonanto ricevos libron pri Ĉeĥoslovakio.

Aktiva estraro

La semajnoj post la decido de UEA okazigi Universalan Kongreson en Helsinko signifis ardan laboradon por la estraro de EAF. La asocio estis invitinta la kongreson, nun komenciĝis la tempo pagi la promesojn. La unua tasko kompreneble estis elekti la Lokan Kongresan Komitaton, kiu respondecos pri la sukceso. Ni scias, ke la estraro kunvenis preskaŭ ĉiusemajne ek de la 19-a de januaro, kaj ke tre malofte forestis iu estrarano kavankam du el ili loĝas fore de Helsinko. Vere malofta aktiveco.

Personoj bone informitaj pri agado de la estraro rifuzis sciigi, kiuj estas elektitaj al la LKK, sed ni tamen asias, ke jam la 8-an de februaro oni decidis pri ĉiuj postenoj krom la prezidanta, kiu vakis ĝis la 7-a de marto. La elekto de EAF ankoraŭ bezonas aprobon de la estraro de UEA, kio eble klarigas la silentemon pri la kandidatoj.

Kvankam la LKK ne estas naskita, oni jam agas por la kongreso. En la lasta numero de EF vi vidis kelkajn proponitajn kongresmarkojn. Diversaj entreprenoj por ricevi subvencion por la UK estas efektivigataj. La kongreso okazos ĉefe en Otaniemi (en la Teknika Altlernejo kaj Dipoli), la inaŭguro verŝajne en la Foira Halo.

NE DONU AL ILI ARMILOJN!

Reĝo Gustaf la kvina estis fervora ĉasisto. Kiam li maljuniĝis, oni portis lin sur seĝo, de kiu li povis pafi alkojn. Foje li alvenis sur sia "alkoseĝo" unu horon tro frue al kunveno de la registaro. Al pedelo li diris: "Veku min, kiam la ministroj alvenos." Sekve li dormis. Post unu horo la pedelo vekis la reĝon, dirante: "Nun ili alvenas."

"Kie estas mia pafilo?" kriis la reĝo. "Donu al mi tuj la pafilon."

(Eino Valtonen)

KULTURA SUKCESO

Komence de julio 1967 okazis en Opava, Ĉeĥoslovakio, "Esperantista kultura festivalo", kiun partoprenis 330 personoj, inter tiuj 36 alilandanoj. La programo estis altkultura: esperanta prezento de artistoj el Silezia teatro en Opava kaj de instruistina koruso, paroladoj de eminentuloj, ekspozicio de ĉeĥoslovakaj esperantistaj artistoj k.a. La oficiala delegitaro de lokaj aŭtoritatoj komprenis la festivalon grava kultura entrepreno por la tuta urbo Opava kaj ties distrikto ĝenerale.

Okaze de la festivalo aperis bildkartoj pri la urbo kun esp-a teksto, oni uzis specialan poŝtstampo kaj eĉ okaza medalo estis stampita. Ĉiu partoprenanto ricevis broŝuron pri la poeto Petr Bezruč (kies 100-jaran datrevenon oni omaĝis) kaj la urbo — la broŝuro estas escepte plaĉa laŭ grafika vidpunkto, bedaŭrinde la bildoj estas riproĉinde malklare presitaj.

EFEKTIVE EK!

"Ni ja konsideru ke en ĉi tiu jaro ISAE fariĝas 60-jara, do sufiĉe matura por efektive eklabori."

(Bulteno de ISAE, n-ro 30)

ESPERANTA MONDMAPO

La unua mondmapo kun esperantaj loknomoj aperis. La prezo kun sendokostoj unu dolaro aŭ 4,40 mk de la ĉefdelegito. Aĉetante ĝin vi helpas jugoslavojn vojaĝi al la kongreso.

Joel Vilkki
SOMERO 9
pĝk Tu 60253

Mastro de 4000 tuboj



MASTRO DE 4000 TUBOJ

— Ludi orgenon estas kiel gimnastika ekzercado. Kaj same kiel sportisto, tiel ankaŭ orgenisto maljuniĝante bezonas pli kaj pli da ekzercado por fleksi la artikojn. Tamen, eĉ abunda praktikado kaj klopodado ne certigas daŭran junulecon, kaj oni do mia-aĝe jam volonte sin retiras. Ĉi tiel asertas sinjoro Pauli Riihivaara, muzika direktoro kaj diplomita orgenisto, kiu antaŭ ne longe festis sian 65-jariĝon kaj nun forlasas sian oficon kiel orgenisto de nia nacia sanktejo, la katedralo en Turku. Sinjoro Riihivaara estas esperantisto jam de antaŭ 50 jaroj.

Ni laikoj povas admire sidi sur preĝeja benko kaj ravite aŭskulti la imponan muzikon, sed necesas vidi la ludanton por povi kompreni kia lerto de la manoj, de la piedoj kaj de la kapo estas bezonata por naski la solenan sonadon. Orgeno kun 4000 tuboj estas giganta maŝino, kies funkciadon la orgenisto kondukas per ampleksaj aroj de klavoj, butonoj, pedaloj.

INTERESO VEKITA JAM EN KNABA AĜO

Muziko kaj precipe orgena muziko allogis jam la knabeton Pauli Riihivaara. Li tiam konstruis por si revorgenojn el ŝrankoj kaj seĝoj, kaj la orgena galerio en la preĝejo de Merikarvia estis altira celo de liaj esploroj. Naŭjara li estis permesata havi muzikajn lecionojn por harmoniumo. Fininte mezlernejon li ekstudis en Helsinko ĉe la Instituto por Eklezia Muziko kaj ĉe la Konservatorio (Sibelius-Akademio), kiu diplomis lin en 1938. Poste li servis kiel kantoro-orgenisto en Tyrvää ĝis 1955, la jaro de lia enoficiĝo en en Turku.

Proprajn koncertojn sro Riihivaara donis nur malmulte, sed en sennombraj

diversaj festoj li ludis, ĉu sole, ĉu akompanante. Orgenisto ja ne ludas nur dum diservoj kaj preĝejaj muzikvesperoj, sed ankaŭ geedziĝoj, enterigoj kaj multspecaj religiaj ka. okazaĵoj de multaj societoj laborigas lin. Foje sro Riihivaara donis muzikon por 13 geedziĝaj kaj 5 enterigaj ceremonioj en unu tago. — Krome, li kompreneble devas ankaŭ sin ekzerci plurajn horojn ĉiutage.

PIANO, VIOLONĈELO KORUSO, ESPERANTO

Plej ofte la orgenisto mem estas permesata elekti muzikon por la solenaĵoj, kaj tiam direktoro Riihivaara preferas je J. S. Bach aŭ Cesar Franck. En nupto — se la gefianĉoj tion permesas — estas de li aŭdigata nek Mendelssohn nek Kuula, sed anstataŭe ekzemple la Solena Marŝo de Erkki Melartin aŭ io de Wagner aŭ el franca muziko. Por enteriga ceremonio li ŝatas, krom Bach, ekzemple la funebrajn marŝojn de Kuula kaj Beethoven.

Ekster siaj abundaj laboroj sro Riihivaara trovis tempon ankaŭ por ŝatokupoj. Muziko ĉiam estas proksima al li: Pianon kaj iam ankaŭ violonĉelon li plezure ludas. Koruson li ĉiam entuziasme direktis. Lia nuna koruso plej esperante nomiĝas "Amikaro", kaj en ĝia repertuaro ne mankas esperantaj kantoj. (TS/Pi)

PROSPEKTO PRI FINNLANDO

Turisma Asocio de Finnlando eldonos en esperanto faldfolion pri Finnlando. Ĝi enhavos kolorajn bildojn, tekston kaj mapon de la tuta lando. Eldonkvanto verŝajne 20 000.

KAJ PRI TAMPERE

La ĉefo de la urba turisma oficejo en Tampere jam certigis, ke aperos esperantlingva broŝuro pri la urbo.



Organisto Pauli Riihivaara kaj parto de lia impona instrumento.

SVEDA KONGRESO

Sveda Esperanto-Federacio jarkunvenos pentekoste, 1-3 junio 1968, en Sundsvall, havenurbo samlatituda kun Kaskinen. La gastiganta klubo "Amika Rondo" atendas multajn anojn kaj mencias, ke la kongreskotizo estas senpaga por ekterlandanoj. Programo: kongreslaboro, diskutado, prelego, distraĵoj, ekskurso... Letermarkoj aĉeteblaj jam nun: sendu 3 rpk al Esperantokongresen, SUNDSVALL, Svedujo.

BALTMARA SEMAJNO

La tradicia "Semajno de la Balta Maro" en Orienta Germanujo okazos de la 7-a de julio ĝis la 14-a en Rostock, kiu samtempe solenos sian 750-jaran jubileon. La loka grupo petas partoprenontajn esperantistojn kontakti kun Esperanto-Grupo-Kulturbund-25, Kröpeliner Str. 25, Rostock. Se vi ŝatus viziti la urbon dum la Semajno, petu informojn pri favoraj vojaĝkondiĉoj ĉe Suomi-DDR-Seura, Kaisaniemenkatu 1 B 41, Helsinki; telefono 669 126.

Ĉu vi fondas societon ?

Se vi intencas fondi kaj registri lokan esperanto-societon aŭ registri tian jam ekzistantan, vi devas formuli por ĝi lauleĝe akcepteblan regularon (statuton). Modelon de tia statuto (kompreneble nur propono) vi povas peti de la prezidanto de EAF, sinjorino Irja Klemola, Nunna, LITTOINEN.

KORESPONDEMAJ

Sinjoro Dušan Karas, Černej armády 81, PREŠOV, Ĉeĥoslovakio. Teatra reĝisoro kaj arta ĉefo de Teatro Jonáš Záborský en Prešov. Kor. pri teatro, muziko kaj literaturo. Interŝ. gramofondiskojn (kol. operojn), E-literaturon kaj bildkartojn.

Sinjoro Sándor Vámos, Ságvári krt. "D" ép., III-lépcsőház, Fsz 4, SZOLNOK, Hungarujo. 16-jarulo, entuziasma propagandisto de Esperanto. Dez. ekkoni la vivon de la gejunuloj.

Leteroj al la redakcio

DUOBLO AU KVITO?

Troviĝas rimedo, per kiu bonmemora esperantisto povus interesigi grandnombran televidantaron pri nia lingvo. Jam la 11-an jaron, la ekrano lunde montras la kvizon "Tupla tai kuitti" (duoblo au kvito), bone konatan lukton de memovirtuozoj, kiu fojon post fojo altiras multe da rigardantoj. Ĉu ne estus bone motive provi partoprenon de "scianto pri esperanto"?

En ĉiu agantaj esperantokluboj, -societoj kaj -kursoj oni unue aranĝu eliminajn konkursojn. Poste la venkintoj konkuros inter si. La plej bona sciulo el ili verŝajne jam kuraĝus sin anonci al la televida konkurso.

La ludonto devas jam sin anoncante doni al la kvizgvidanto, s-ino Rautiainen, informojn pri literaturo de la fako kaj pri personoj povantaj helpi en formulado de la demandoj (se la sinjorino mem ne estas esperantisto?).

Kiam la Kongreso okazos en Helsinko, oni povus provi eĉ internacian turniron: la finna "Esperanto-Kivikoski" kontraŭ la "Internacia Erudiciulo". Tio estus REKLAMO!

Nun do, vi bonmemoruloj junaj, kaj kial ne ankaŭ iom pli maljunaj, enkapigu sciojn pri la lingvo — tio povas gajniĝi al vi 1000 markojn krom la nemezureblaj honoro, famo kaj sukceso. Mi mem jam estas, ho kiel bedaŭrinde,

"Tro Maljuna"

ESTIMATA REDAKTORO

En la numero de ESPERANTA FINNLANDO 1967/8-9 mi legis la interesan artikolon de S-ro P. Lobut; kaj ĉar li dufoje citas min mi sentas la neceson respondi.

- 1) Kiam mi skribis, ke "en Esperanto la distingo estas afero de stilo, ne de gramatiko", mi volis diri, ke tiel estas en kazoj, kiel tiu de la citita frazo el *Danielo* 4,33. Mi estus devinta aldoni "ofte", kaj klarigi, ke restas malmola nukleo de kazoj, kie la diferenco estas esenca, kie ia ajn kompromiso estas neebla, nome ĉe la pasiva preterito.
- 2) Estas vere, ke la itismo kuntrenas kun si la rezulton, ke Esperanto havas "unu formon por du tempoj (tensoj)", nome la pasiva preterito kaj la pluskvam-

perfekto; sed ankaŭ la atismo kuntrenas tion, nome la pasivan preteriton kaj la pasivan imperfekton. Plue tamen, tiu malagrablo de la atismo havas kiel rezulton, ke la litero A havas du signifojn, tiun de daŭro kaj tiun de finiteco. Nu, temas pri tio, ke ni elektu la malpli malagrablan. Laŭ la itistoj, la kazoj de kolizio inter p.p. kaj p.k.p. estas tre maloftaj, kaj la konservado de la litero A por signifi daŭro estas tre utila kaj esenca ero de Esperanto.

Ili estas itistoj tamen unualoke pro tio, ke Esperanto ĉiam estis tia kaj tiamaniere verkas la preskaŭ-tuteco de niaj verkistoj; ĝis tia grado, ke kiam oni trafas en ekzemplon de "estis -ata", oni emas tuj supozi preteraron aŭ simplan nescion ĉe la aŭtoro. Tiuj, kiuj submetis la verkon de Jung pri la Konjugacio al detala analizo, trovis, ke, kvankam utila kiel minejo de zamenhofaj participaj frazoj, kiel pruvo pri lia atismo ĝi estas tute senvalora. Same, lia respondo al la listo de germanaj ekvivalentoj de frazoj tradukitaj de Zamenhof per "estis -ita" (komunikaĵo de la Akademio) estas tia elturniĝo, kia konvinkus neniun.

La itistoj ne bezonas varb-kampanjon por sia vidpunkto, havante jam ĉe-flanke 99% el la Esperantistaro, plejparte senkonscie kaj el nura instinkto. Pro tio ili nun silentas.

Altetime,
D.B. Gregor
Northampton, Anglujo
9 jan 68

"ĈU VI PAROLAS ESPERANTON"

Kun atento kaj vigla intereso mi legis la numeron 8-9/1967 de "Esperanta Finnlando". (Inter parentezoj: La titolo "Esperanta Finnlando" ŝoketas min; kion do esperas Finnlando?? — Kial ne "Finnlanda Esperanto-Gazeto", simile al "Germana Esperanto-Revuo" kaj aliaj?)

Sloganoj. Mi dankas vin pro la publikigo de mia propono "Ni uzu taŭgan sloganon!", kaj s'ron (?) SURFO (?) pro la tiu-rilata analizo ĝisfunda (pĝ. 66/67). Volonte mi konsentas pri kelkaj argumentoj de s'ro S., des pli ke, jam dum pluraj jardekoj, mi estas tre antenta pri komerca rek-

lamado kaj sloganoj. Verki sloganojn ja estas arto kaj scienco, kaj postulas konojn pri praktika psikologio. Nu, mi ne volus aserti, ke mia "eltrovaĵo" estas universalrimedo, aŭ magia formulo kiu permesus fari miraklojn en la disvastigo kaj tutmonda uzado de Esperanto. Tamen mi povis konstati, en multaj okazoj, ke la rekta lakona demando "Parlez-vous Espéranto?" vekas respondemon ĉe eksteruloj, ekzemple: "Kiu/ aŭ Kia / lingvo estas tio?" — "Ĉu vi mem parolas Esperanton?" — "Kiom da homoj jam parolas ĝin?" — "Ne, mi ne parolas Esperanton" — ktp.

Jam plurfoje, mi spertis ĉe la landlimoj, ke ĉiuj francaj, svisaj kaj germanaj doganistoj tie deĵorantaj legis (foje laŭte) la demandan frazon; 80% da ili iom interparolis kun mi (en afabla aŭ iom ŝercema maniero, sed neniam mokeme aŭ malafable!) kaj duono de ili petis informilon. Mi konsideras tion kiel bonan kaj utilan informmanieron, des pli ke la plimulto el la nomitaj homoj eĉ ne konis la vorton "Esperanto".

La efiko de tiu (aŭ alia) slogano sur veturantaj aŭtomobilistoj eble ne ĉiam estas pozitiva; sed kial supozu ke, tiam, ĝi nepre estos negativa? Kompreneble, ne havus sencon voli polemiki pri tio; nur sistema esplorado de la opinioj povus doni fidindajn konkludojn. — (Flanka demando: Kion signifas la finlingvaj frazoj "Ala-Tölöviö" kaj aliaj, en la koncerna artikolo?) Por fini: Objektive pripensinte, mi ne havas la impreson, ke la slogano "La mondo bezonas lingvon" de s'ro S. enhavas la dezirindan elvokivecon kaj sugestivecon, ĉar ĝi estas nepersona kaj aspektas iom stratosfere.

Pri ata/ita. La artikolojn de s'roj Harri Laine, Paul Lobut kaj R.J. Milton mi plene aprobas. Unua kaj ĉefa postulo estas: demokrateco. Laŭ mi, estus tre dezirinde sendi tiujn du artikolojn al ĉiuj Akademianoj kaj al aliaj konataj samideanoj kiuj jam partoprenis la diskuton pri tiu afero.

samideanajn salutojn

Albert Lienhardt

Mulhouse, Francujo

9 jan 68

AL SRO LIENHARDT

Kvankam via letero estas adresita al la ĉefredaktoro, vi certe permesas, ke mi

respondas ĝin, ĉar ĝi plejparte koncernis mian skribaĵon. — Unue iom pri via parenteza noto: La Plena Vortaro diras prave kaj trafe, ke 'nomo' estas 'vorto per kiu oni aparte signas k distingigas iun au ion'. Multaj bataloj restus nebatalitaj, se oni ĉiam memorus tiun difinon. Ne malofte oni aŭdas opiniojn, kiuj baziĝas sur tiu miskredo, ke 'nomo' estas sinonimo de 'detala klarigo pri la enhavo' aŭ 'ingrediencoj' au eĉ 'avizo pri la uzo'. Mi ne asertas, ke estas nepre malbone, se nomo havas ankaŭ ĉi tiujn ecojn, sed ili certe estas nur flankaj kaj ofte kontraŭas aliajn same flankajn argumentojn (ekz. mallongecon, memoreblecon; tute simple: oportunecon). Kompreneble estas malbone, se nomo vekas en ies menso malbonajn pensojn, sed mi vidas nenion malbonan en la demando "kion do esperas Finnlando?" — eĉ se ĝi havas du demandsignojn. "Esperanta Finnlando" certe estas *aparte signa* kaj *distingiga* vortgrupo, kion tute kontraŭas via sugesto igi ĝin *simila* al aliaj nomoj. La nomo eble povus esti pli bona, sed la 50-jaran tradicion de "Esperanta Finnlando" ne estas facile konkuri.

Mi sentas min vere flatita per via diro, ke mia skribaĵo estis "analizo ĝisfunda" pri via sloganpropono. Mi celis ĝin nur kiel simplan babilon por plenigi iun vakaĵon en la gazeto. La babilon inspiris via tre interesa propono. Mi akcentas, ke la sloganon "Ĉu vi parolas Esperanton?" mi trovis nur bona; ĝi estas vere universala. Miaj kritikaj rimarkoj estis tute ne gravaj kaj mi vere ĝojis trovinte esperantiston kun profesiecaj reklam-ideoj.

Nur nun mi rimarkis, ke mia artikolo enhavis multon, kiu certe restis tute enigma al niaj eksterlandaj legantoj: ĝi havis aludojn al finnaj sloganoj, netradukitajn finnalingvaĵojn kaj eĉ kelkajn versojn el Kalevala. Nu, "Ala-Tölöviö" estas netradukebla loknomo (dialekta, eble ridetiga), "Mie oon muu-alta" signifas "Mi estas alilokano" (same dialekta); la frazon "Ohi vaan, manalassa tavataan" mi tradukus ekzemple "Kuraĝe pretere, ni renkontos subtere" kaj "Itse en ole vihainen, mutta kavahda (tiele!) vaimoani" signifas simple "Mi mem ne estas kolera, sed timu mian edzinon".

"La mondo bezonas lingvon" estas adaptaĵo el "La lando bezonas prezidenton", kiun sloganon uzis la finna konservativa partio antaŭ la januaraj elektoj. La slogano estis tre multe pridiskutata; oni ĉefe argumentis pri tio, ĉu ĝi estas simpla konstato el la konstitucio de Finnlando (la lando

certe bezonas prezidenton) aŭ insulto pri la nuna prezidento aŭ ĉu ĝi nur signifas, ke la partio fine publike deklaras, ke ĝi jam agnoskas Finnlandon kiel respublikon kaj ne eĉ kaŝe revas pri reĝo. La afero plu restas neklara. "La mondo bezonas lingvon" certe ne estas universala slogano, sed ankaŭ "stratosfereco" estas iam laŭdinda.

Por ke mi restigu al niaj eksterlandaj amikoj ankaŭ ion neklaran, mi fine donas ekzemplojn pri tio, ke verŝajne neniu vorta esprimo estas absolute universala laŭ sia aplikebleco. Lokaj kondiĉoj povas kiun ajn sloganon aŭ eĉ nomon maltaŭgigi. Ĉi tiel povas simpla propra nomo ricevi tute neatenditajn kvalitojn, kiam ĝi transiras lingvolimojn: En 1960 oni multe parolis pri la franca poeto Saint-John Perse, kiu tiam gajnis Nobel-premion. Nu, la "Perse" certe kaŭzis kordolorojn al delikataj finnaj poezi-amantoj, kiuj ne sciis kiel ili tordu sian langon por ne tro laŭlitere prononci la nomon. Alia ekzemplo estas politikisto el Finnlando, sro Kull, kies (svedlingva) nomo efektive donis al kelkaj ĉefredaktoroj kialon malpermesi ĝian uzon en iu alia kazo ol nominativo. Kaj tio vere estas malpermeso, se temas pri la finna lingvo, kiu havas proksimume 15 kazojn.

Mi restas kun koraj salutoj,
pseŭdonime kaj sincere via
Surfo

KIOMPROCENTA DEVALUTO?

Oni tute prave atentigis al la redakcio, ke la devaluto de Finnlanda mono, kiun ni dufoje menciis kiel 31,25-procentan, fakte estis 23,81-procenta. 'Devaluto' signifas malplivalorigon, kaj tial oni devas esprimi la kvanton de tiu malplivalorigo. La 11-an de oktobro 1967 unu marko nominale valoris 0,27771 gramojn da oro, en la posta tago nur 0,21159

gramojn; la devaluto do estis 23,81-procenta.

Alia afero estas tio, ke en la praktiko la finnoj sentas ĝuste la 31,25-procentan prezaltiĝon de eksterlanda mono, kaŭzitan de la malplivalorigo de nia marko. Cetere, Esperanta Finnlando ne estis la sola gazeto kiu parolis pri neĝustaj procentoj; ŝajne ĉiuj ĵurnaloj en Finnlando kaptis nur la pli grandan nombron (pli ŝoka, pli plaĉa al ĵurnalisto). Tamen, kiam oni poste skribis pri la devalutoj en Britujo, Danujo kaj aliaj landoj, oni menciis tute ĝuste la procentojn de malplivalorigo. Ĉi tio montras, ke la registaro de Finnlando faris psikologian eraron, kiam ĝi en sia sensacia devaluta sciigo entute menciis la nombron 31,25%; la ĵurnaloj kompreneble tuj utiligis ĝin en siaj rubrikoj. — h.l

KLUBOJ AGAS

TURKU

La 24-an de marto Esperanto-societo en Turku aranĝas "HISPANAN VESPERON", kies programo konsistos el vojaĝraporto, koloraj filmoj, komuna kontado ktp. ktp. Nia klubejo estas Martta-yhdistys, Puutarhakatu 7 a. Gastoj estas tre bonvenaj.

En la fino de aprilo turkuanoj ekskursos aŭtobuse al Helsinki por ekkoni pli detale nian ĉefurbon kaj la kongresejon de la 54-a UK. Espereble ni renkontos dum nia vizito en Hki ankaŭ reprezentantojn de la Esperanta movado.

HELSINKI

Esperanto-klubo de Helsinki invitas ĉiujn pasigi komunan vesperon mardon la 2-an de aprilo kaj mardon la 7-an de majo je la horo 19.00. Adreso: Siltasaarenkatu 12 A, 8-a etaĝo, ĉambro n-ro 1. Prezo por la regalo: minimume 1 marko. Programproponojn sendu al: R. Viinämäki, Flemingink. 12b A 13, HKI 53.

ESPERANTA FINNLANDO (fondita en 1918), ĉefredaktoro: Vilho Setälä

Adreso: Esperanta Finnlando, Lokero 13048, Helsinki 13. A p e r a s 9-foje jare. A b o n p r e z o j: enlanda 5 mk, eksterlanda 6 mk (15 rpk); abonu prefere per la poŝta ĝirkonto 6915. A n o n c p r e z o j: tutā paĝo 100 mk, duona 50 mk, kvarona 25 mk; pli malgrandaj unukolonaj 0,35 mk/mm. — E l d o n a s Fondumo Esperanto.

Redaktoroj: Harri Laine, R. J. Milton. Ĉies kontribuajoj estas bonvenaj.